

LA RONDO

Esperantista daneo

Elpensita de sinjoro Rafel Tudó y Durán, direktoro
de l' « Esbart Català de Dançaires » de Barcelono,
laŭ pirineaj popolaj arioj kaj daneoj, kaj enhar-
: : : moniigita de profesoro Leopold Botey : : :

Desegnaĵoj de sinjoro Ismael Smith

Eldono de la komitato
: de la V^a Kongreso :

Barcelono



0-20

7
900

78
TUD
1928

LA RONDO

Esperantista daneo

Elpensita de sinjoro Rafel Tudó y Durán, direktoro
de l' « Esbart Català de Dançaires » de Barcelono,
laŭ pirineaaj popolaj arioj kaj dancoj, kaj enhar-
: : : moniigita de profesoro Leopold Botey : : :

Desegnaĵoj de sinjoro Ismael Smith

Eldono de la komitato
: de la V^a Kongreso :

Barcelono



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Fedracio
Rodríguez San Pedro 13 - 3^o - 7, E-50015 KAJMID
Tel. +34 - (91) - 4498078



2367

La Rondo estas dancota de paroj da gedancistoj, kaj ĝia muziko konsistas el tri partoj, kiuj sin ripetadas senfine, ĝis kiam dancistoj kaj muzikistoj estas elĉerpinte sian tutan forton. Oni povas haltigi ĝin ĉu interkonsente ĉu laŭvole; kaj okazas al *La Rondo* tio, kio okazas al preskaŭ ĉiu danco: muzikistoj povas ludi sen dancistoj, sed tiuj ĉi malfacile povas danci sen muzikistoj.

Ni imagu, por la plej bona komprenigo de la danco, ke tiun ĉi ekdancas kvar paroj da gedancistoj, kiujn ni nomos: *paro 1^a*, *paro 2^a*, *paro 3^a* kaj *paro 4^a*.






II^a Parto

(8 taktoj, de la litero C ĝis la litero D)

Farinte la *ŝraŭbon*, la sinjorino de la *Paro 1^a*, restas kontraŭ la sinjoro de la *Paro 4^a*, la sinjorino de la *Paro 2^a*, kontraŭ la sinjoro de la *Paro 1^a*, k. t. p., kaj kompreneble, ĉiu sinjoro restas kontraŭ la sinjorino, de la *Paro*, kiu dancis la unuan parton je lia dekstra flanko. Tiam, unu kontraŭ la alia, kaj ne foriĝante el la loko, ĉiu gedancisto saltas laŭ polka takto kun malgranda movo dekstre-maldekstren kaj male: oni

komencas polki per la dekstra piedo, kiun oni antaŭenigas; poste oni antaŭenigas la maldekstran, k. t. p., ĝis kiam la parto finiĝas (litero D).

Tiam ĉiu dancisto prenas per sia dekstra mano la maldekstran manon de la dancistino, kiu estas kontraŭ li (t. e.: la sinjoro de la *Paro 1^a* prenas la manon de la sinjorino de la *Paro 2^a*, la sinjoro de la *Paro 2^a* prenas la manon de la sinjorino de la *Paro 3^a*, k. t. p.). Ili levas la brakojn, kies manoj estas prenitaj, kaj la sinjorino pasas sub la arko de la brakoj, farante novan *ŝraŭbon* dum la takto montrita inter du * (litero D. ĝis E).



Rigardado



III^a Parto


(19 taktaj, de la litero E ĝis la litero F)

Farinte la duan ŝraŭbon, ĉiu dancisto sin trovas apud la sinjorino de la paro, kiu dancis antaŭe ĉe lia dekstra flanko. Sekve, la dancisto de la *Paro 4^a* renkontas la dancistinon de la *Paro 2^a*; la dancisto de la *Paro 3^a*, la dancistinon de la *Paro 1^a*. (Se la paroj estas multenombraj ili troviĝas pli malproksime.) Tiam, la dancisto prenas per sia maldekstra mano la dekstran manon de la dancistino, kaj li ĉirkaŭprenas per la dekstra mano ŝian talion; la dancistino prenas per sia dekstra mano la maldekstran de la

dancisto kaj ŝi apogas sian maldekstran manon sur la dekstran ŝultron de la dancisto. En tiu ĉi pozo, la paroj, sin sekvante unu la alian, polke kuras dekstren kaj ronde.

Kiam tiu ĉi parto estas finita (litero F) la dancisto prenas per sia dekstra mano la maldekstran manon de la dancistino, kiu pasante sub la arko de la levitaj brakoj faras novan trian ŝraŭbon dum la takto montrita inter du * (litero F ĝis G).

Farinte tiun *ŝraŭbon*, okazis nova interŝanĝo de gedancistoj, kiuj ronde sin prenante reciproke la manojn, komencas danci la unuan parton, k. t. p.



Klarigoj

La nombro da paroj povas esti senfina.

En la danco estos tiom da dancistoj, kiom da dancistinoj; sekve, oni alvenos al la rondo po paroj.

La paroj povas eniri en la rondon, kiam ili volos, kvankam la danco estas komencita. Estas konsilinde tamen, ke oni eniru nur dum la unua parto (litero A ĝis B) por eviti ĉiun konfuziĝon kaj interrompon. Enirante, la paro zorgos disparigi neniun paron kaj sin loki tiamaniere, ke dancisto troviĝu inter du dancistinoj kaj male.

La danco finas kiam la muzikistaro ne ludas plu. Ĉe la fino povas okazi, ke ĉiu dancisto restas kun dancistino, kiu ne estas tiu, kiun li invitis al la dancado. En tiu okazo, la dancisto trairos la salonon aŭ placon akompanante la dancistinon ĝis kiam tiu ĉi renkontos la danciston, kiu invitis ŝin. Tiam okazos interŝanĝo de dancistinoj, kaj la interŝanĝado daŭros ĝis kiam la dancisto renkontas sian invititinon. Tiu ĉi fino de *La Rondo* ebligas ĝentilajn kaj internaciajn interparoladojn kaj respondas al la celo de Esperantistaj kunvenoj.





F. GIRÓ, IMPRESSOR
CARRER DE VALENCIA, 233
BARCELONA



O'120. 3.